# BULTENO
# DE ESPERANTISTA KLUBO
# EN PRAHA • Fondita en 1902

LOKA GRUPO DE ĈEA n-ro 1/1986 januaro 1986

## 1986 — La Internacia Jaro de la Paco

En la kunsido de la Ĝenerala Asembleo de UNO en la jaro 1983 estis la jaro 1986 proklamita La Internacia Jaro de la Paco. Ĝiaj ĉefaj celoj estas la jenaj:

1. Instigado de komunaj kaj efikaj aktivecoj de UNO, de ŝtatoj-membroj, de interŝtataj organizaĵoj, de neŝtataj organizaĵoj, de edukaj kaj kulturaj instancoj, de altlernejoj kaj de amaskomunikiloj por apogo de la paco surbaze de Ĉarto de UNO.

2. Plifortigado de UNO kiel la plej grava internacia sistemo, kiu dediĉas sin al la subteno kaj defendo de la paco.

3. Atentigo al formado de bazaj premisoj por la paco en la nuntempa mondo kaj perado de inicoj, precipe al la paco, kiel la premiso de disvolviĝo kaj socia progreso, sekureco, nacia sendependeco kaj justeco, al senarmigo kaj forigo de nuklea katastrofo kiel de esencaj fundamentoj de la paco...

Kiel emfazis la partoprenantoj de la kunsido de la estraro de MPK, kiu okazis en Moskvo de la 22-a ĝis la 25-a de marto 1985, en la aktivecojn de la Internacia Jaro de la Paco diversforme aliĝos ankaŭ la MPK, la pac- kaj kontraŭmilit-movadoj, organizaĵoj kaj grupoj en la tuta mondo.

Tiamaniere ili volas kontribui al plenumiĝo de teksto de la dokumento de ĜA UNO, kiu i.a. tekstas: "... Jaro 1986 ankoraŭ ne estos la jaro, en kiu ĉie regos la paco. Sed ĝi devas esti la jaro de aktivecoj por la paco kaj de serioza pensado pri la esenco de la paco kaj pri la kondiĉoj necesaj por la paco...".

("Starto" n-ro 4-5/1985)

---

NI INVITAS
ĈIUJN MEMBROJN DE NIA KLUBO AL LA J A R K U N V E N O , KIU OKAZOS EN LA KLUBEJO EN MALINOVÁ-STRATO L U N D E L A 2 4 - A N DE F E B R U A R O 1986.

---

## I N T E R S K I T A G O J '86 KAJ V E R M A T '/86

Esperanto-klubo ĉe muzeo de Janko Král en Liptovský Mikuláš komisiite far CK de SEA organizas INTERSKITAGOJ (Internaciaj ski-tagoj) lige kun VERMAT (Vintra Esperantista Renkontiĝo en Malaltaj Tatroj). Ambaŭ entreprenoj okazos okaze de la 65-a datreveno de la fondo de KP de Slovakio kaj okaze de kunsido de la XVII-a kongreso de KPĈ.

Ambaŭ entreprenoj okazos en valo de civito Liptovský Ján, distrikto Liptovský Mikuláš, en rekreiga centro de sindikat-organizaĵo dum menciitaj datoj:

INTERSKITAGOJ: de la 16-a ĝis la 20-a de februaro 1986
VERMAT: de la 21-a ĝis la 23-a de februaro 1986.

Programo de INTERSKITAGOJ: Skiado (alpa, norddisciplina), lernado de skiado, vintra turismo, naĝado, societa kunsido kun prelego pri historio de laborista movado en Liptov-distrikto, lingvaj ekzercoj, projekciado de filmoj kaj lumbildoj, la programo enhavas la tuttagan peraŭtobusan ekskurson al civito Ľubochňa, kie troviĝas memor-ĉambro, en kiu okazis la fonda kongreso de KPS. La ekskurso estos ligita kun vizito de rekreiga centro Málino Brdo ĉe urbo Ružomberok kun eblecoj de skiado. Ne mankos eĉ tradicia kaj ŝatata nokta tablotenisa turniro.

La unua servo: vespermanĝo la 16-an de februaro 1986,
la lasta servo: tagmanĝo la 20-an de februaro 1986.

Programo de VERMAT: Malfermo la 21-an de februaro je la 19-a horo, 22-an de februaro ekskurso al Okcidentaj Tatroj – valo de civito Žiar, prelego pri la 65-a datreveno de la fondo de KPĈ: societa vesperfesto. Dimanĉe skiado, ekskurso al la valo de civito Liptovský Ján kun trairo al skicentro en civito Závažná Poruba, fermo de la entrepreno.

La unua servo: vespermanĝo la 20-an de februaro 1986,
la lasta servo: tagmanĝo la 23-an de februaro 1986.

Partoprenkotizo:

| | Membroj ĝis 30-j-aĝo: | de SEA kaj ĈEA: super 30-j-aĝo? | Eksterlandaj. partoprenantoj: |
|---|---|---|---|
| INTERSKITAGOJ: | Kčs 400,- | Kčs 500,- | Kčs 800,- |
| VERMAT: | Kčs 200,- | Kčs 250,- | Kčs- 400,- |
| Ambaŭ entreprenoj: | Kčs 550,- | Kčs 700,- | Kčs 1.100,- |

Aliĝilojn kaj pluajn informojn laŭ postuloj sendos Esperanto-klubo, nám. Osloboditelov 31, 031 01 Liptovský Mikuláš, ĈSSR.
Ni ĝojas je revido inter montoj de Slovakio!!!

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

Por nia sano.

Jindřich Ondráček:

## Nia vestaĵo

Kial ni vestas nin? "Por defendi nin antaŭ la malvarmo kaj varno, antaŭ pluvo kaj vento". Tiaj estus plejparte la respondoj. Sub nia vesto tage kaj nokte, printempe aŭ somere, aŭtune aŭ vintre ĉiam estas temperaturo de 32 ĝis 35° C. Sub nia vestaĵo ĉiam estas la klimato de norda Afriko.

La vestado estas tre malnova. Ĝi devenas verŝajne de la tempo de la homa evoluo. Krome, ni portas la vestaĵon por ke ni plaĉu al la aliaj. Pli frue ni povis laŭ la vestaĵo dividi la profesiojn. Oni povis laŭ la vestaĵo ekkoni masoniston, viandiston, ĝardeniston, aŭ klerulon. Ankaŭ hodiaŭ ni povas ekkoni la laborantojn de trafiko (fervojistojn, poŝtistojn, laborantojn de metroo aŭ de tramo), policistojn, arbaristojn ktp.

Se ni pripensas la vestaĵon, estas necese pripensi multajn higienajn kaj societajn vidpunktojn. Nia vesto devas esti aerplena. Ĉiu scias, kiel maloportune estas, se ni devas pli longe resti sub la gumomantelo aŭ en la mantelo el la artefarita materialo, se pluvas.

La vestaĵo devas esti lavebla. Tio ĉi rilatas ne nur la suban tolaĵon, sed ĉiam pli ankaŭ la supran vestaĵon. La virinoj estas en tiuj ĉi sferoj jam antaŭe. Male, estas preskaŭ nekompreneble, kial viroj preskaŭ ĝenerale uzas dikan, vestaĵon kun subŝtofo, en kiu restas la polvo ĉe la tuta jaro, kaj kiun oni ne povas lavi. Tiu ĉi vesto devenas el la tempo de franca revolucio, kiam ĝi estis progresema. Intertempe la mondo tiom ŝanĝiĝis, ke nun jam estas la tempo ankaŭ la viran vestaĵon akomodi al novaj kondiĉoj.

La suba tolaĵo devas esti bolpurigebla. Kotona kaj lina tolaĵoj tiun ĉi preferindecon havas. Ĉu ankaŭ modernaj, artefaritaj fibroj por tolaĵo estas bona materialo, estas demando, kiun respondos la estonteco.

(Finota)

Bohuslav Sutnar

L A  S O R T O  D E  L A  L E O N O

(Fino)

En sia malkuraĝa humoro ĝi rezonis pri tio, kion ĝi dum lasta feliĉa tempo iomete forgesis, kiel la homoj, kiuj kun ĝi komunikiĝis, ne estas inteligentaj. Sia nova dresisto estas malsimpatia aroganta stultulo kaj la cetera personaro estas ankoraŭ pli stulta.

Kian vivon ĝi vivas! Ĝi estas malliberigata en la kaĝo kaj la manĝaĵo estas dubekvalita. Pere de teroro ĝi estas devigata submetadi sin al la dresado en la tempo, kiam ĝi volus ripozi kaj ĝi devas prezenti sensencaĵojn antaŭ la publiko tiam, kiam ĉiu sagaca kreitulo dormas.

Kial ĝin rigardas tiel stulte kun larĝe malfermitaj kaj timegigitaj okuloj tiuj malsprituloj ekstere de la kradoj?

Komence de tempo al tempo ĝi ekkriegis al ili por timegigi ilin. Kun plezuro ĝi observis ilian ektimon, kiam ĝi ekĵetis sin kontraŭ la kradojn, kvazaŭ ĝi volus ilin trarompi. Eĉ tio ĝin post certa tempo tedis. Ĝi ĉesis konsciiĝi pri malsimpatiaj konsternitaj spektantoj kaj kun antipatio ĝi limigis al plenumado de ekzercoj ordonitaj per dresado.

Al la personaro de la cirko ĝi faris zorgojn. Ĝi estis bela kaj valora besto kaj ĝia perdo signifus grandan financan perdon. Tial oni rezonis kiamaniere helpi al ĝi superi febliĝon. La spertaj laboruloj konkludis, ke estos efike plibonigi ĝian seksan kontentigon. Nome la leonoj ĉi-rilate estas tre bravaj. Ili lokigis en ĝia kaĝo pluan kunulinon, junan kaj temperamentan leoninon. Ĝi faris kontraŭ ĝi pretendojn energie. Konkurenco incitis la unuan kunulinon de Ami, kiu ne volis esti neglektata, kaj eĉ ĝi postulis nun pli grandan plenumadon de siaj rajtoj.

Sed la intelekta sfero de Ami ne realiĝis. Ambaŭ leoninoj estis evidente stultaj kaj oni povis amuziĝi kun ili pri nenio alia el pri la plej primitivaj vivaferoj. Ĝi ne ĉesis rezonadi pri sia sorto:

- Mi bele aĉigis mian vivon. Malprudente mi rezignis pri mia libereco, je kiu mi havas kiel ĉiu viva kreitulo plenan kaj nerezigneblan rajton. Estis pli bone vivi libere, loĝi diversmaniere, eble eĉ iam suferi de malsatoj ol lasi sin malliberigi kaj terorigi. Kiel miaj gepatroj kaj parencoj estis sensciaj! -

Sensukcese ĝi provadis klarigi siajn opiniojn al ceteraj leonoj. Ili estis tute apatiaj al sia humiliga stato, ili eĉ esprimadis sian kontenton. Ĉu libero? Por kio ĝi estus al ili? Ili fartas bone, ili jam alkutimiĝis al komforto kaj civilizacio. Kian feliĉon ili serĉus en primitivaj cirkonstancoj de la sovaĝa naturo? Kaj la homoj kondutas konvene al ili. Ĉe sia malalta inteligenteco kaj mallaboremo ili ne komprenis la klarigojn de Ami, ili eĉ ne komprenis ĝian intelektan sopiron pri la libereco vekitan de ekkono de la civilizaciaj negacioj.

Neniam pli frue ĝi pripensis tion, ke ĝi povus forlasi sian malliberejon. Sed nun ĝi eksopiris eliĝi eksteren. Mallonga observado kondukis ĝin al ekkono, ke la kaĝo estis fermita nur per levileto. Ĝia iometa levo sufiĉis, por ke la pordeto malfermiĝu.

Unufoje vespere ĝi atendis kiam la homoj kaj bestoj jam dormis kaj ĉie regis absoluta trankvilo. Per la piedo ĝi facile la pordeton malfermis kaj post si denove fermis. Ĝi estis libera! La sento de la libereco ebriigis ĝin, ĝuste ĝi ekkurus kaj kurus kiel eble plej malproksimen. Avertis ĝin la prudento: - Vi estas en nekonata medio! Vi devas ĝin antaŭ ĉio esplori por ne vojerari revenantel Vi tamen ne povas supozi, ke vi sukcesos je la unua fojo tuj fugi!

Ĝi rampis singarde el unu malluma loko al alia, por ke ĝi de neniu estu ekvidita. La unua promeno sukcesis, ĝi revenis sen malfacilaĵo. Ĝi poste eliradis al noktaj ekskursoj tre ofte kaj ĝi kuraĝis al ĉiam pli granda distanco. Iam ĝi revenis nur antaŭ tagiĝo.

La urbon, en kies periferio la cirko situis, ĝi evitadis. Anstataŭ tio ĝi konatiĝis kun ĉirkaŭa pejzaĝo. Ĝi neniel kontentigis ĝin. Ĝi nepre ne similis al ĝia naskiĝstepo, kvankam ĝi memoris ĝin nur nebule. Ĉi tie ĉiu grundo estis kulturita, ĉi tie troviĝas multaj homaj loĝejoj kaj trapasadas ĉiudirekten vojoj, tra kiuj moviĝas sennombraj aŭtoj. Ju pli bone ĝi la pejzaĝon ekkonis, des

pli certe ĝi sciis, ke ĝi ĉi tie ne volus kaj ankaŭ ne povus libere vivi.

Dum longa tempo ĝiaj ekskursoj sukcesadis sen tio, ke ĝi estis vidita, tamen ĝi foje estis ekvidita. Ekestis ĝenerala konsterniĝo. En la urbo kaj ĉirkaŭaĵo estis deklarita alarmo, estis mobilizita polico, estis alvokitaj fajroestingistoj kaj armeo. La leonon ili ne trovis. Ĝi rampante traŝovis sin nerimarkate reen en la cirkon, fermis post si la kaĝon kaj ŝajnigis dormon.

Kompreneble oni esploris, ĉu el la cirko fuĝis iu leono, sed sen rezulto. Neniu supozis pri leono tian inteligentecon, ke ĝi kapablus la kaĝon malfermi kaj fermi. Tamen ĉiuokaze estis ordonita nokta inspekto de bestoj.

Dum multaj tagoj Ami poste ne povis nokte promenadi. Nur post kelkaj semajnoj ĉesis noktaj kontroloj kaj la juna leono kuraĝis novan ekskurson. Ĉe forlaso de la kaĝo ĝi ne supozis, ke ĝi ĉi-foje eliras lastan fojon por ĝui momentan liberecon. Ĝi ĝuis fuĝon kaj ĝi forvagis multe pli malproksimen ol iam antaŭe. Ĝi starigis sur alta roko super la rivero kaj ĉirkaŭrigardis la pejzaĝon briligitan de luna brilo.

Momento de bela silento estis interrompita per bruo de multnombraj motorveturiloj, kiuj proksimiĝis al ĝi. Konusoj de lumoj tralumigadis la pejzaĝon. Ĝi ekkomprenis, ke ĝia malproksimiĝo estis malkaŝita. Ĝi rezonis, kion ĝi en tia situacio faru.

- Daŭrigi fuĝon estas senespere. Provo al reveno en la patrujon estas anticipe kondamnita al malsukceso. Mi ne scias, kiudirekte mi ekiru kaj la celo verŝajne estas malproksime. Mian sklavecon mi povas facile disronipi per libervola finigo de mia vivo per salto en nigran profundaĵon sub la roko. Tian malkuraĝan agon mi ne kapablas. Restas al mi nur revenprovo. —

Sukcese ĝi evitadis siajn persekutantojn kaj ĝi sukcesis trairi ĝis tuŝapuda proksimeco de la cirko. Ĉi tie sur la lumigita placo ĝi estis kaptita. Vidante neeviteblecon ĝi kapitulacis, ekkuŝis teren kaj atendis.

Ĝin ĉirkaŭis bruanta popolamaso kaj blindigis ĝin al ĝi celitaj lumĵetiloj. Ĝi ekaŭdis voĉojn vokantajn, ke oni uzu kontraŭ ĝin larmigan gason aŭ ŝpruciltubojn kun torento de akvo.

Sed aŭdiĝis la voĉo de ĝia dresisto trankviliganta troajn fervorulojn: - Lasu ĝin por mi, ĝi certe revenos kun mi! -

Li alpaŝis al la leono, manbatetis ĝiajn ŝultrojn, mankaresis ĝian kolhararon kaj alvokis: — Ami, leviĝu kaj iru! —

Al ĝenerala mirego la leono kompleze obeis la alvokon, ĝi leviĝis, sekvis sian komandanton kaj eniris en la kaĝon.

La noktaj ekskursoj por Ami tute finiĝis. Eĉ tiuj stultaj homoj ekkemprenis, ke la leono ellernis nekredeblaĵojn, malfermi sian kaĝon. Tial ili sekurigis ĝian klinkon kaj de ĉiuj ceteraj kaĝoj per seruro.

Ami ankoraŭ longtempe malĝoje pripensadis sian malliberecon: - Ekstere mi neniam kurrefreŝiĝos. En tiu ĉi lando ne ekzistas kondiĉoj por libera leona vivo. -

De la leonoj antaŭ nelonge kaptitaj en Afriko, kun kiuj ĝi de tempo al tempo renkontiĝadis, ĝi aŭdis, ke la homa civilizacio progresas nereteneble eĉ en ĝia hejmlando. La ĉasejoj malpligrandiĝas, la nombro de ĉasbestoj malaltiĝas, eĉ la nombro de la leonoj malkreskas pro ilia ĉasado kaj kaptado. Ankaŭ tie ilia libera vivo finiĝas.

Dumtempe ĝi rekonis, ke la evoluon oni ne povas ŝanĝi. Ekestis tempo, de kiam la leonoj povas vivi nur en la kaptiteco. Ĝi do submetis sin al la sorto kaj ĝi ĉesis pensi pri la libereco.

FINO

Reymond Schwartz

Anstataŭ lingva rubriko...

Se mi ĝuste interpretas kelkajn nebulvizaĝajn onidirojn, niaj honorindaj akademianoj nuntempe cerbumadas pri la ellaborado de regulo koncerne la refleksivojn si kaj sia. Kvazaŭ tio ne estus jam sufiĉe komplika en si mem. Menciinde ĉi-loke estas tamen, ke kelkaj kursgvidantoj alportis per siaj personaj, originalaj, pedagogiaj konceptoj, esencan plifaciligon en la ĝusta aplikado de la refleksiv-regulo. Jen, kiel la plej sukcesa inter ili instruas al siaj lernantoj, prenante kiel bazan ekzemplon la sencoplenan frazon "la trinkejestro akompanis sian klienton al lia hejmo". Li diras: "Rilate al la trinkejestro, kiu estas la subjekto, la kliento estas LIA kliento. Pro tio vi devas diri SIA. Sed la hejmo estas LIA. Pro tio vi devas diri LIA. Facile, ĉu ne? - Sed post tio la lernantoj ankoraŭ hezitas. Kompreneble, ĉio komplikiĝas, se oni volas inkluzivi en la simplan regulon ankaŭ okazajn glitojn de Zamenhof. Konata estas la klasika "Ŝi vidis la reĝon kun sia krono...", kiun kelkaj gramatikistoj defendas kiel regulaĵon, ĉar reĝo kun sia krono estas nedisigebla unubloka tuto. Kiel danĝeraj estas tiuj subtilaĵoj, montras ĉi-sube la Aventuro de Reĝo Humbug I-a:

La bona reĝo Humbug I-a kaj lia filo, kronprinco Izidoro, estis elĉerpitaj. La tutan matenon ili devis paradi en la tronsalono kun ĉiuj ceremoniaj falbalaaĵoj: kronoj, sceptroj, tintiloj ktp. Fine ili povis retiriĝi. Apenaŭ alveninte en la manĝoĉambron, ambaŭ tuj demetis siajn superfluaĵojn, ŝovis la kronojn sur la kamentabulon, ĉetabliĝis kun granda apetito kaj atendis siajn pantoflojn. Sed jam enpaŝis la ĉambelano por anonci: "Reĝa moŝto, ĵus alvenis delegacio de la parizaj Esperantistoj. Ili petas aŭdiencon." — "HA, kia tedo!" ekgrumblis la reĝo, sed lia scivolo estis pli forta ol lia apetito. "Bone", li decidis, "mi iras kaj likvidos ilin en la daŭro de unu kanonpafo." - Dirinte, li sin direktis al la koridoro, sed antaŭe, pasante preter la kameno, li kaptis unu kronon, ĝin premis sur sian kranion kaj marŝadis digne al la tronsalono.

"He?" miradis la kronprinco, "Esperantistoj?? Tion oni devas vidi!" Kaj ankaŭ li ekkuris tra la longa koridoro. Sed survoje, li havis subitan ekpenson: ĉu mia patro ne eraris pri la krono? Ŝajnas, ke pro sia hasto li prenis la mian. Nu, tion mi ja konstatos tuj. Kaj alveninte sur la sojlon de la tronsalono, la kron-princo scivole prigardis unue la kapon de sia patro. Kion li vidis? Li vidis la reĝon kun sia krono! Kaj dum la delegacio de la parizaj Esperantistoj propagandis al la reĝo, ke Esperanto estas lingvo belsoha, fleksebla, facile lernebla, eĉ de reĝoj, kun reguloj tre simplaj, sen ia escepto, restis tamen la demando, ĝis hodiaŭ nesolvebla de la unublokistoj: Kies kronon havis la reĝo?

\- - -

La ĵus pasinta jaro (1952, rim. de la red.) postlasis por ĉiam la plej profundan impreson en la memoro de niaj akademianoj. Por ili tiu jaro estis aparte peza. Por ili ĝi estis la Jaro de la laboro! Tio estas apenaŭ imagebla. Efektive, dum 1952 niaj akademianoj oficialigis la sufikson -end. Ho,- mi jam scias, ke kelkaj ĉikanuloj tuj rikanos senadmire: "Nu, kiel kuŝas la merito? Ĉu tio ne signifas, tute simple, ke niaj akademianoj malfermis pordon jam delonge malfermitan? Ĉu tio - nome malfermi aŭ fermi pordon jam malfermitan aŭ jam fermitan aŭ eĉ tute ne ekzistantan, nur imagitan - ĉu tio ne estas programnumero perfekte plenumata ĉiutage de multaj klaŭnoj en ĉiuj cirkoj de la mondo? "Konsentite, kara, sed bonvolu senŝaŭmigi vian koleron. Kaj pripensu, ke niaj akademianoj ŝuldas al sia propra reputacio enmeti en tiujn klaŭnogestojn multe da seriozeoo kaj multe da digneco, por ke ilia konsekradoformulo konservu almenaŭ certan minimumon da soleneco. Kaj en tio, se vi bone pripensas, kuŝas kun la merito ankaŭ la malfacilaĵo. Kio nun rezultos el la kunkuŝo de tiuj du, merito kaj malfacilaĵo, tio ne plu koncernas nin."

\- - -

Oni informis viron, ke lia forestanta edzino baldaŭ revenos en lian hejmon. Li diris nur: "Jes – baldaŭrinde".

La programoj de la klubkunvenoj en la unua jarkvarono de 1986:

| | | |
|---|---|---|
| 6.1. | Libera tribuno<br>Trarigardo de la Esperanta gazetaro | <br>— H. Štruncová |
| 13.1. | Esperanto en la radio | — V. Němeček |
| 20.1. | Promeno tra Potsdam kaj Sanssouci (lumbildoj) | — D-ro Horský |
| 27.1. | Versoj de Eli Urbanová (kazedo kun muziko) | — E. Seemannová |
| 3.2. | Angla vespero<br>Trarigardo de la Esperanta gazetaro | — R. Howard<br>— H. Štruncová |
| 10.2. | La ĉeĥoslovaka Esperanto-movado post la dua mondmilito | — L. Kynčl |
| 17.2. | Dek jarojn sen Kalocsay | — J. Patera |
| 24.2. | J a r k u n v e n o  d e  l a  K l u b o | |
| 3.3. | Esperanto en Ligo de Nacioj | — J. Ondráček |
| 10.3. | La artaj valoroj de la literaturo<br>"Monologo por Eva" de J. Rumler | — J. Rumler<br>— E. Seenmannová |
| 17.3. | La aŭtuno en Gigantmontaro (lumbildoj) | — J. Šperling |
| 24.3. | La poezio kaj Esperanto<br>Trarigardo de la Esperanta gazetaro | — J. Karen<br>— H. Štruncová |
| 7.4. | Veteranoj de la Esperanto-movado | — J. Cíchová |

La kunvenoj okazas ĉiulunde inter la 18.30 kaj 20.00 horo en la klubejo en Malinová strato en la Ĝardena Urbo.

---

La komitato de la klubo dankas al jenaj samideanoj, kiuj lastatempe donacis al la klubo monsumojn: Olga Ungerová 500,- Kčs, Marie Klementová 50,- Kčs, Rudolf Pleskot 10,- Kčs, Jan Šilhán 70,- Kčs, Dr. Rudolf Horský 10,- Kčs, Anna Kubová 50,- Kčs, Marie Zámostná 50,- Kčs, Ladislav Kynčl 10,— Kčs, Ondřej Jeníček 10,- Kčs, Anna Frysová 110,- Kčs, Jaroslav Mařík 20,- Kčs.

La komitato de la klubo dankas al samideanoj František Brandejs kaj Jaroslav Mařík, ke ili disponigis vortarojn por lernantoj de niaj kursoj. Samokaze ni petas ĉiujn klubanojn, kiuj povas donaci aŭ vendi superfluajn vortarojn, ke ili faru tion kaj helpu tiamaniere al niaj kursanoj.

La komitato de la klubo dankas al s-ano V. Němeček, kiu donacis al la kluba biblioteko libron de Z. Adam: Historio de Esperanto 1887 - 1912.

La komitato de la klubo dankas, al ĉiuj samideanoj, kiuj donacis malnovajn okulvitrojn por la Agado E-3 (Esperantistoj esperigas Esperantistojn), kaj atentigas, ke la kolektado de okulvitroj daŭras plu.

La 17-an de oktobro 1985 okazis solena kunsido de la Urba Pac-Konsilantaro kun la pragaj brigadoj de socialisma laboro portantaj pac-titolon. Por nia klubo la kunvenon partoprenis la prezidantino s-anino H. Štruncová.

Pozitivan recenzon pri nia Bulteno elsendis Radio Zagreb la 10-an de novembro 1985.

Kiu posedas la Unuan Lernolibron de Esperanto por ĉeĥoj el la jaro 1890? La Esperanto-rondeto en Olomouc bezonas fotokopion aŭ kseroksan kopion de la titolpaĝo por publika ekspozicio en la jaro 1987. Ili rekompencos ĝin per la esperantlingva libro, detektiva romano Mi en li, eldonita de Moraviaj Esperanto-Pioniroj. La fotokopion de la titolpaĝo de la unua ĉeĥa lernolibro de Esperanto sendu al Vlastimil Blažek, vilao Esperanto, Dvořákova 36, 772 00 Olomouc.

---

BULTENO de KLUBO DE ESPERANTISTOJ EN PRAHA (loka grupo de ĈEA), pk. 1069,
Praha 1. Redaktas: Kultura komisiono de la EKP-komitato.